

The British Esperantist

n^o 663 · december 1960

one shilling



**La Golfo de Bournemouth—urbo de la 45a
Brita Kongreso de Esperanto, je Pasko 1961**

The British Esperantist

Publishers:

THE BRITISH ESPERANTO
ASSOCIATION, INC.
140, Holland Park Ave.,
London, W.11

Editor:

D. B. GREGOR, M.A., L.B.E.A.
27, Rushmere Road
Northampton

Contributions must be type-written, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements: £3 per page and pro rata to one-eighth.

CONTENTS

	page
Do it again, please. <i>N. Smith</i> ..	345
From Far and Near	347
Tri semajnoj en Hungarujo. <i>J. R. Jump</i>	349
45th British Esperanto Congress	350
46-a Universala Kongreso ..	350
Krucvort-enigmo. <i>A. D. Cook</i> ..	350
Novaj Libroj	351
Poezia Angulo. <i>J. C. Wells</i> ..	352
El nia Leterkesto	353
Programo de Radio Zagreb ..	353
La Junularo Esperantista Brita. <i>T. G. Page</i>	354
Nekrologo: Prof. D-ro G. Canuto. <i>H. W. Holmes</i>	354
Translation Competition 27 ..	355
The K.R.C. Sturmer Translation Competition	355
Leterkonkurso	355
Official Notices	356

IDEAL CHRISTMAS PRESENTS

FOR YOUR ESPERANTIST FRIENDS OR FOR YOURSELF

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

By L. L. Zamenhof

The standard guide to Esperanto style. Beautifully printed on good quality paper and strongly bound in cloth, stamped in green and gold.

442 large pages, price 18s. 9d., postage 1s. 6d.

LA VIVO DE NIA SINJORO JESUO

Charles Dickens; trad. M. C. Butler

Written by the author for children. A beautiful book printed on vellum, with full-page illustrations from famous paintings. Elegant green cloth binding lettered in gold.

120 pages, 9½ in. by 7 in., price 6s., postage 1s.

Published by

The Esperanto Publishing Company Limited

Order from

The British Esperanto Association, Inc.,
140, Holland Park Avenue, London, W.11

The British Esperantist

(incorporating "International Language")

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

56TH YEAR, NO. 663

DECEMBER, 1960

La parolvico al nia Prezidanto :

DO IT AGAIN, PLEASE!

As I write these words the traditional Christmas preparations are in hand with all their colour, gaiety and spirit of giving. While you read them Christmas may have passed and the new year be well on its way, but I hope that the happiness, merriment, and generosity of that time are still with you. I am reminded of the wonders of my first conjurer and the seeming miracles he performed: the title of this article comes from the eager plea for some magic feat to be performed a second time.

Surely the world language, Esperanto, and the movement which has grown around it, is itself a miracle, one inspired with the spirit of good-will and peace to all men, which is so characteristic of this season. The Esperanto miracle is one which is clear to any who have used it in International Congresses and for International contact of any kind. It is even more miraculous to those who, like myself, have had the opportunity to see how small are the resources behind the tremendous results that we have achieved; and I think we can honestly call the achievements of the movement "tremendous", even though we can all see so much more to be done.

The force behind this miracle are ourselves, we Esperantists, whose faith has sustained the movement through many difficulties and past many crises, until now it is a body to be reckoned with and respected, a body which makes real and vital contributions to the cause of world understanding. Of course we are all inspired by the faith and persistence of Dr. Zamenhof and by the loyal selfless service of many Esperantists of the past.

I want to talk now, however, about one particular accomplishment of the British Esperanto Association, its present state and its future destiny. This is the B.E.A. Library, created, maintained, built up and defended by the vision, generous devotion, and outstanding ability of one man, Mr. M. C. Butler. It nevertheless stands as our achievement, helped by our gifts and by the support of the Association. It is a valuable cultural repository, a means of advancing the language, and it constitutes a most impressive symbol of the status of the language. But as well as being an achievement of the British movement, it is also a most heavy responsibility. Here, in the modest house at Kingston, are treasures and rarities of the Esperanto movement invaluable to students and historians; every phase of the language is represented, every item of literature preserved. The whole is indexed, and

classified in a unique and effective way. We must not let our work and that of Mr. Butler be broken up!

Many have described the extensive riches of the Library far better than I could do. Suffice it to say that, whenever I have taken a new visitor to the Library, nothing I could say beforehand could convey the reality, and the usual comment afterwards is to say: "Well, you did not exaggerate at all."

Now the Library is in danger. The premises are to be demolished to make way for modern flats. Mr. Butler, whose long service has done so much to give us the Library, will have to seek accommodation elsewhere and will need more and more assistance to keep the good work going.

The Executive Committee have worked and thought very hard indeed to find the best solution; special sub-committees have sat and discussed every possible way of ensuring the future of the Library; every possible trust and public body has been approached for financial or other help. Here are the results:—

- (1) We cannot count on or even hope for any help from any outside body; we are thrown on our own resources.
- (2) The Executive are satisfied that we must retain the Library in the trusteeship of the B.E.A.; for only the Association will have the understanding and devotion to maintain the Library as it should be maintained.
- (2) There is only one practical solution to the accommodation problem; namely to adapt the first floor of 140, Holland Park Avenue. This can be done and detailed plans are well under way. The Library can and will be worthily housed there.

In this way members will even gain, since the more accessible position of the Library will permit its more effective use (of course under suitable conditions to ensure the safety of the books).

Unfortunately this costs money. A first estimate of costs suggests that to supply the necessary furniture, lighting, heating and structural alterations, together with the cost of transporting and rearranging the stocks, will cost about £600. From then on steady maintenance costs, building up of stocks, binding, library services and indexing will cost approximately 200 pounds each year. (We cannot always count on such selfless energy as Mr. Butler has given.)

If we, the British Esperantists, want to preserve the B.E.A. Library then we must be prepared to pay for it and find a sum not only to pay for the cost of housing the Library in suitable premises, but also for its continued existence. The Executive Committee have therefore set up an appeal to be known as "The B.E.A. Library Rehousing Fund", with which we hope to finance the cost of rehousing and also create a reserve for future maintenance.

So now I come at last to the point and purpose of this article. You, the British Esperantists, have performed wonders in the past, not the least of which is the creation of the B.E.A. Library; without doubt a unique treasure, under the control of Esperantists. Will you, **please, do it again**, repeat the effort and self-sacrifice which made the Library what it is, to save it from its present dangers and pass it on intact to our successors? I am sure that the man whose labour and service have done most towards this achievement, Mr. M. C. Butler, will be most effectively thanked by your enthusiastic response to this appeal. Please be generous; here is something well worth while!

N. R. Smith.

FROM FAR AND NEAR

At Home

London: Divine Service in Esperanto will be held in the French Protestant Church, Soho Square, W.1, on Sunday, 8th January, at 3.15 p.m. Mr. A. D. Debenham will conduct. All will be welcome.

The London Club New Year Ball will take place on 6th January, price 2s. 6d.

Hamilton, Lanark: The Education Authority advertised and organised a class in Larkhall Community Centre with the support of the Workers' Educational Association. Eleven pupils have been attending regularly.

Scouting: About fifty Scout Masters and Girl Guide Leaders from fourteen different countries heard a lecture on Esperanto on 8th November. A number of Mr. Butler's little grammars were sold.

Nelson: Mr. Arthur Mulligan, winner of last year's Buchanan Prize, has had a long article about the Brussels Congress published in a local paper, and has started an evening class in the Nelson College of Further Education. At a meeting of the Lancs. and Cheshire Federation in Blackburn on 15th October he also received prizes as one of the winners in a literary competition and as one of the best local candidates in the recent R.S.A. examination.

Blackburn: On 15th October the Group delighted the Federation with a performance of their own translation of the play "Hodiaŭ el ĉiuj tagoj". The next Federation conference will be held in the Central Hall, Oldham Street, Manchester, on Saturday, 28th January.

Stoke-on-Trent: The intensive course at Wedgwood Memorial College, organised by Mr. H. Barks,

a former mayor, and Mr. J. Baggaley, with Miss M. Boulton in charge of the teaching, was a conspicuous success. Designed to provide teachers of Esperanto for local schools, it enjoyed the collaboration of Mrs. E. M. Boulton and Mr. W. Auld, whose lectures were much appreciated, and the practical advice of S.B.E.T. and Mr. N. Williams.

Birmingham: Recent Club activities have of late born a distinct Grecian flavour. Illustrated lectures were given by Mr. and Mrs. Melton of their visits to Greece and Yugoslavia. Another by Miss Robins showing Greece, Italy, Sardinia, Sicily, etc., seen on her Mediterranean cruise, and thirdly an excellent talk by Miss Nixon dealing with two Greek tragedies.

Bournemouth: Divine Service in Esperanto will be held at Friends' Meeting House, Avenue Road, on the first Sunday of each month, at 3.30 p.m. On 1st January Mr. H. T. Debenham will conduct.

Bromley: Mr L. S. Hartridge has been active in the Technical School for Boys. After a talk and an exhibition, twenty-six boys have paid a subscription of 2s. 6d. to join the Club, and the School Scout Troop are interested in the language.


Croydon: The Youth Club's Mini-bus took part in the Old Crocks' procession to Brighton, thus bringing the name of the language before the crowds who watched it. They joined with Brighton Young Esperantists to celebrate Guy Fawkes' Day.

Abroad

Svisujo: De la 24-a de decembro 1960 al la 2-a de januaro 1961 okazos skiferio en Adelboden, skistacio en la Bernaj Alpoj alta je 1,400 metroj.

Adresoj: Por aliĝi skribu al *Esperanto*, La Sagne (N.E.), Svislando. Dum la skirestado la adreso estos: *Esperanto*, Chalet Egghaus, Boden, Adelboden, Svislando.

Aliĝo: Bonvolu aliĝi kiel eble plej rapide pere de poŝtkarto, kie vi mencias vian nomon, antaŭnomon, adreson, naskiĝdaton, profesion, alventagon kaj forirtagon en la skirestado kaj eventualajn rimarkojn (bonvolu skribi preslitere). Ĝiru samtempe la antaŭpagon de svisaj frankoj 25.— (84 steloj) al nia poŝtĉekkonto *Esperanto-Junularo de Svislando*, La Sagne (Neuchâtel) IV 6291. Aliĝo nur valoras post la ricevo de la antaŭpago.



Grupo da partoprenantoj de la 2a Geografia Semajno, en Rovinj, Jugoslavio.

Jugoslavio: En Rovinj, sur la nordjugoslavia marbordo, la 2-a Geografia Semajno okazis de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto.

Ankaŭ ĉi-jare la vetero tre favoris la Semajnon, ĉar el la sep tagoj kvin estis sunoplenaj kaj donis eblecojn por perfekta somerumado. La kristalpura akvo de la blua Adrio montriĝis ideala tereno por submara esplorado, kaj la matena freŝeco de la pinarbaro pleniĝis la pulmojn de la amantoj de la joga sistemo, kiun pluraj membroj regule praktikadis.

Dum la semajno okazis 5 prelegoj. Du pri Finnlando, faritaj de la finna

samideano J. V. Kostiainen, dum pri Nepalo, pri Japanujo kaj pri la ajnua popolo prelegis kun lumbildoj kaj magnetofona muziko Lic. Tibor Sekelj. Krom tio okazis studrondoj pri antropologiaj kaj geografiaj temoj, kaj muzika vespero "Promeno tra Azio".

Denove montriĝis ke la kunveno de geografoj kaj antropologoj — profesiaj kaj amatoraj — kaj de aliaj esperantistoj interesataj pri esploradoj kaj vojaĝoj, povas transformiĝi en somerumadon utilan kaj agrablan samtempe, por relative malalta kosto. Pere de tiu ĉi Geografia Semajno la Internacia Geografa Asocio plenumis pluan gravan taskon.

La 3-a G.S. okazos tuj post la 46-a Universala Kongreso, ie en Britujo, tiel ke multaj kongresanoj povu ĝin partopreni. Detaloj sekvos.

Wrocław: En septembro oni enkondukis Esperanton dume kiel nedevigan sed enprograman instruobjekton en kelkaj ŝtataj mezlernejoj, nome en du ĝeneralklerigaj liceoj, en unu pedagogia liceo kaj en la liceo de plastikaj artoj. Krome oni instruas la lingvon, simile kiel pasintjare, ankaŭ en la ŝtata muzik-liceo.

Pcr realigi la alvokon. "En ĉiu lernejo — almenaŭ unu propra instruisto," la profesia asocio de pola geinstruistaro estas organizinta komence de la nova lernejjaro grandan kurson por la aktivaj geinstruistoj el kelkdek vroclavaj popol- kaj mezlernejoj.

Gejunuloj el ĉiuj landoj! Skribu ilustritajn kartojn aŭ leterojn al viaj polaj 14-17 jaraj multnombraj koleginoj el pedagogia liceo. Ilia instruisto S-ano Lasinski, prezidanto de la E.-Asocio, garantias persone, ke ĉiu el vi ricevos ilian respondon. Vian unuan leteron al polaj junulinoj adresu tamen jene: Redaktoro Lasinski, Pola Radio, Wrocław (Pollando).

TRI SEMAJNOJ EN HUNGARUJO

Mi esperantistiĝis antaŭ ses jaroj, kaj mi ofte parolis la internacian lingvon kun francoj, germanoj kaj hispanoj; sed mi parolas sufiĉe bone la francan, la germanan, kaj la hispanan. Ĝis aŭgusto de 1960 mi neniam parolis Esperanton kun samideano kies nacian lingvon mi ne scias. Do mia vizito al Hungarujo estis, por mi, granda lingva aventuro.

Kun mia edzino kaj mia dekonujara filo mi veturis per mia propra aŭtomobilo, kaj survoje ni vizitis Bruselon, Köln, München, Salzburg kaj Vienon. La 9-an de aŭgusto la hungara doganisto superkure rigardis mian veturilon, kaj diris al ni, "Bonan veturon".

Mia korespondanto, Profesoro Laszlo Toth, atendis nin en la eta vilaĝo Pilisvorösvár, apud Budapesto, kaj kune ni veturis al lia hejmurbo Sztálinváros, kiu kuŝas sur la okcidenta flanko de la Danubo, sesdek kilometrojn de la hungara ĉefurbo.

Sztálinváros, nomata "la unua socialista urbo de Hungarujo," estas tute nova. Antaŭ dek jaroj estis tie nur maizkampoj. Nun estas belaj loĝejoj por la 35,000 enloĝantoj, grandega ferkombinato, diversaj fabrikejoj, lernejoj, parkoj, kino, teatro, naĝejo, sportareno, hoteloj, restoracioj kaj modernaj sinservaj butikoj.

Kun mia amiko, kiu gastigis nin, ni vizitis lernejojn (kies ekipaĵo estas pli bona ol la ekipaĵo en anglaj lernejoj), agrikulturan kolektivon, fabrikejojn kaj la administrejojn de la urba kaj la regiona konsilantaroj. Ĉie oni montris vivan intereson pri Esperanto, kaj post nia vizito al celulozfabrikejo la ĉefingenero diris ke li nepre lernos la internacian lingvon.

Rapide—tro rapide—pasis ses tagoj en Sztálinváros kaj ni veturis al Balatonlele, refreŝigejo ĉe la bordo de la lago Balaton, la "hungara maro". Tie, dum du tagoj ni banis nin, velboatis kaj remboatis.

Refreŝigitaj, ni veturis trans la granda hungara ebenaĵo ĝis la urbo Debrecen, tridek kilometrojn de la rumana landlimo. La veturo estis iomete enuiga. Ne estas montetoj, nek arbaroj, kaj la vojo estas ĉiam tute rekta ĝis la horizonto. Tamen la vojo estas bona kaj oni povas rapide veturi. Ni faris la veturon en kvar horoj kaj kvarono, distanco de 275 kilometroj.

En Debrecen atendis nin granda grupo de samideanoj en la "Arany Bika", la plej granda kaj luksa hotelo en la antikva urbo. La sekvontan tagon ni vizitis la fervojan riparejon, la universitaton, la protestantan preĝejon, kaj la lernejon, kiun ĉiuj hungaroj konas, ĉar en ĝi kunvenis la parlamento de la unua hungara respubliko post la revolucio de 1848.

Tro baldaŭ ni devis adiaŭi nin, kaj reveturi al la okcidento, al Budapesto, kie ni trovis S-ron Pál Bálkanyi en la ĉeflokalto de la Hungara Instruista Sindikato. Kun li ni vizitis la Bestgardenon, la "Porinfanan Respublikon"—grandegan tendaron por pioniroj, kaj vespere la klubejon de la Esperanta Fakrondo de Poŝtistoj. Ĉeestis ankaŭ du samideaninoj el Bulgarujo kaj Danujo, kaj S-ro Julio Baghy persvadis nin paroli al la anoj pri niaj impresoj pri Hungarujo.

Ni pasis tri tagojn en Budapesto, kiel gastoj de la Instruista Sindikato, kaj ni vidis la belan parlamenton, la Fiŝistan Bastionon, kaj la impresegan monumenton al la sovjetaj soldatoj kiuj mortis dum la 1945-a liberigo de la ĉefurbo.

Fine ni veturis al Györ, al la hejmo de Profesoro Andor Gauder, kiu instruas la rusan, la anglan kaj

Esperanton. En la Sindikata Domo li aranĝis por mi tri kunvenojn: unu por Esperantistoj; unu por angle parolantoj; kaj unu por pedagogoj, kiuj volis aŭskulti mian priskribon de la brita eduka sistemo. Por la lasta parolado mi havis belan junan interpretistinon, studentinon de Budapesta Universitato.

Kun Prof. Gauder ni vizitis la Benediktinan monaĥejon kaj gastlernejojn (Jes, la privataj ekleziaj lernejoj funkcias normale en Hungarujo!) apud la vilaĝo Györszentmarton. Tie, en malgranda ĉambro, ni povis paroli dum kelkaj minutoj kun tre maljuna benediktina frato esperantista.

Niaj tri semajnoj en Hungarujo finiĝis, kaj ni devis reveturi hejmen. Denove la hungara doganisto preskaŭ ne rigardis mian aŭtomobilon. Denove li diris al ni "Bonan veturon".

Kaj mia filo demandis, "Kie estas la fera kurteno? Mi ne vidis ĝin."

James R. Jump.

45th British Esperanto Congress


Arrangements are going steadily ahead. An innovation this time is that the Congress is being run jointly by the B.E.A. and the L.K.K., an arrangement which relieves the latter of part of the burden. While the L.K.K. is seeing to the provision of the Town Hall and rooms for sectional meetings and the Licentiate examination, the Ball on Saturday, the Church Service and Congress Lunch on Sunday, the excursions on Monday and the provision of light refreshments in the evenings, the B.E.A. is arranging lectures, musical and other cultural items; and it is hoped that the joint efforts will result in a very successful and enjoyable congress. More particulars will be given in a later issue of some of the items to be presented by the B.E.A.

A.H.M.

46-a UNIVERSALA KONGRESO

Harrogate—5-12 aŭg., 1961

La januara numero de "B.E." estos Kongresa Numero, riĉe ilustrita. Dume memoru, ke post la 31-a de Decembro la kongresaj kotizoj plialtiĝos.



KRUCVORT-ENIGMO

Notu (r) signifas nur radikoj

Horizontale: 1. Arto reliefe reprodukti la formojn de objektoj; amata. 2. Movi objekton al si (r); bone konata (r). 3. ŝpar-ema uzo de mono en administrado de lando; kredema kiel infano (r). 4. Buŝinterno (r); stango sur ŝipo. 5. Amaso (r); kuirita solvaĵo de sukero (r). 6. Rememori (r); prepozicio; demanda adjektivo. 7. Malkvietigi (r); fari. 8. Prepozicio; nedifina nombra adjektivo. 9. Objekto, aĵo; sovaĝa bovo (r). 10. Longorela besto; rilata al senpeza elasta substanco. 11. kuiri en forno (r); muzika instrumento (r). 12. Paperujo (r); moviĝi. 13. Prepari nutraĵon por maĝo (r); oportunaĵoj de la vivado.

Vertikale: 1. Pretigis; ŝakluda termino (r). 2. Multekoste; viro laŭleĝe ligita al virino. 3. Insulo formita de koraloj (r); fleksebla bastono (r); ekzisti. 4. Juda preĝejo (r); enhavas la polenon de floro (r). 5. Mezrapida kuro (r); diino de la akvoj (r). 7. Sekcio de hospitalo (r); voĉsonado. 8. Flavruĝhara (r). 9. Ano de religia ordeno (r); inspiri piajn sentojn (r). 10. Larga apogejo (r); ĉefo de universitato. 11. Adoras; spino de ŝipo (r); elmoviĝi. 12. Malofta metalo (r); iri per movoj pli rapidaj ol marŝo. 13. Fluaĵo; speco de jara planto.

A. D. Cook.

NOVAJ LIBROJ

Order starred books from the B.E.A., others from the address given

Esperanta resumo de la Stenologio kaj Stenografio de Prof. Delfi Dalmau, Lauria 98, Barcelona — 1960. Prezo 2 resp. kuponoj.

En tiu ĉi broŝureto Prof. Dalmau prezentas kelkajn principojn de Stenologio. Li ankaŭ—tute ĝuste—konkludas, ke moderna stenografio devas esti kursiva kaj ne geometria. Kelkaj trajtoj estas komunaj al diversaj naciaj sistemoj: diversaj longeco kaj dikeco de strekoj; kurbeco, cirkleco, klineco, supreneco kaj malsupreneco. Logika apliko de tiuj principoj kaj trajtoj ja estas rekomendinda por internacia sistemo.

Sed, ho ve! kiam oni venas al la ekzemploj, la praktikanta stenografisto konstatas kun bedaŭro, ke en la broŝuro aperas stenetoj kaj fonemoj tute ne taŭgaj por uzado dum diktado je utila rapideco. La vokaloj estas indikitaj per stenetoj tiom similaj unu al la alia, ke ili nepre fariĝus senformaj aŭ misformaj en la praktiko. Simile, la silaboj, ekz. tan-tin-ten-ton-tun, prezentas tiom malgrandajn diferenciojn en sia formo, ke ili riskas aperi samaj en rapida skribado. La ceteraj ekzemploj konsistas el apartaj substantivoj, kaj la leganto sin demandas kiom longa povus esti vortogrupo se unu vorto estas tiom longe skribenda. Troviĝas neniu indiko pri la diferencigo inter substantivoj kaj adjektivoj (ĉu oni tute simple ellasas la finajon?), kaj neniu indiko pri la grava diferencigo inter singularo kaj pluralo, kun aŭ sen la akuzativo.

La resumo estas tro malkompleta por esti praktike utila. Ĝi povas havi intereson por tiuj, kiuj deziras studi fonetikajn skribojn.

Oni devas supozi, ke por Prof. Dalmau la stenografio estas interesa

hobio el kiu li tiras multan plezuron; sed estas memevidente, ke li neniam stenografis en Esperanto je praktika rapideco.

Mi persone regas Esperantan stenografian sistemon (Prevost-Delaunay) sed neniam dum 30 jaroj havis la okazon ĝin uzi. La estonteco apartenas al la magnetofono kaj similaj aparatoj.

La broŝureto estas ĝenerale klare presita kaj bele prezentita, sed la papero estas iom sorba, tiel ke iuj cirkletoj aperas kiel nigraj punktoj.

M. C. Major.

Eseo pri la dinamiko de la Esperanta vortfarado, de D-ro Andreo Albault. Represajo el Esperantologio, II/1. Havebla ĉe la aŭtoro, 8, Avenue Etienne Billières, Toulouse, kontraŭ 1.50n.fr. aŭ 3 internaciaj rpk., aŭ 5 steloj.

Dinamiko signifas la kapablon, spontane krei kunmetaĵojn laŭ la neceso de la kunteksto. Ĉi-rilate Esperanto havas grandan avantaĝon, ĉar malsimile al Occidental kaj Interlingua, sed simile al la japana kaj armena lingvoj, kaj al la internacia medicina nomenklaturado, ĝiaj sufiksoj kaj afiksoj estas memstare unusignifaj. Ekzemplojn de ĉi tiu kvalito liveras filozofo, kiu redonis la ideon de S-ta Johano 3. 3 per la vortoj *malnaskiĝigi sin*, kaj eĉ pli frape trijara knabeto, kiu, rigardante sian boateton "manĝitan" de la flamoj, plore demandis al la aŭtoro: "Ĝi *malmanĝiĝos*, ĉu ne, Paĉjo?"

Tiel, ne estante ligita al "antaŭpretaj vortoj", Esperanto kiel lingvo havas tiun ĉi grandan superecon, ke ĝi povas facile esprimi novajn pensojn.

D.B.G.

Unesco kehottaa kunnioittamaan Zamenhofin muistoa v. 1960. Esperanto-Säätiö, Helsinki, 1960.

Eldonis ĉi tiun sep-paĝan faldfolion la Esp.-Asocio de Finnlando por kunlabori je la celebrado de la

Zamenhofa jubileo fare de Unesco; sed la plej grava estas, ke disdonis ĝin la tutlanda Instrua Administracio, kaj nome en pli ol 7,000 ekzempleroj al ĉiuj elementaj kaj mezaj lernejoj, instruistaj atlernejoj, popolaj altlernejoj, ktp. Ĝi enhavas, krom admono celebri la jubileon, biografieton de Zamenhof, skizon pri la ĝisnunaj atingoj de la E-movado, kaj inviton al konkuro je pri-Zamenhofa verkajeto. S-ro Vilho Setälä estas gratulinda.

D.B.G.

Ekzercaro (por *Metodo Elementar*). 60 p., broŝ. Prezo 3 steloj. (vidu p. 341.)

Setenta Años de Lingua Internacional de Ivo Lapenna. El la angla tradukis Tenente-Coronel Geraldo Padua. 12 p. Prezo 1 stelo.

Ano Zamenhof. Traduko en la portugala lingvo de la broŝuro Zamenhof Jaro, farita de Henerik Kocher. 8 p. Prezo 1 stelo.

La eldonado de Esperantaj presajoj multe akceliĝis lastatempe en Brazilo. La du unuaj, recenzitaj en Novembro, estas haveblaj ĉe Imaos Pongetti, Rua Sacadura Cabral, 240-A, Rio de Janeiro, kaj la ceteraj ĉe Liga Brasileira de Esperanto, Praca da Republica, 54, 1º, Rio de Janeiro, kontraŭ la cititaj prezoj en steloj aŭ egalvaloro.

C. D. A. Capp.

***Report on the teaching of Esperanto, 1948 to 1960,** at Denton Egerton Park County School by Norman Williams, M.A., B.Sc., F.B.E.A. Obtainable from the author. Price 1s. 3d. or 2 international reply-coupons.

This is surely an ideal form in which to present information about the teaching of Esperanto in our schools! Together with the pamphlet "The Educational Value of Esperanto" (to supply the general picture) this report could be handed with confidence to any school head who is actively contemplating the introduction of Esperanto to the school curriculum.

Whilst clearly outlining the general advantages of having Esperanto on the curriculum the report lays special emphasis on the rapidity with which Esperanto can be acquired, so making it ideal, not only as a *main* foreign language for the non-academic but also as an easy *extra* for the academic.

It is to be hoped that all those actively engaged in teaching Esperanto in our schools will be stimulated by Mr. Williams' report to share their experiences with us in a similar fashion.

Raif Markarian.

DEKLARO PRI "NEPALO"

En la libro *Nepalo malfermas la pordon*, de Tibor Sekelj, eldonita de STAFETO, aperis postparolo kaj geografia mapo, en kiuj kelkaj landnomoj kaj aliaj geografiaj nomoj ne koincidas kun tiuj donitaj en la teksto de la libro. Tia nekonskenco okazis, ĉar la eldonisto kaj la prizorganto de la preso de la libro—pro teknikaj kialoj—ne submetis al la kontrolo de la aŭtoro la postparolon kaj la mapon, en kiuj ili allasis siajn personajn opiniojn.

Pere de tiu ĉi publika deklaro la eldonisto petas senkulpigon kaj esperas, en iu venonta eldono, konsekvence ĝustigi la tuton.

J. Régulo (Eldonisto).

Poezia Angulo

Hark! the herald angels sing

Vibras la anĝelsonor',
 "Al la nova reĝo glor',
 Sur la tero nun pardon',
 Paco inter Di' kaj hom'!"
 Ĝoje en la ĉielkanto
 Akordiĝu ĉiu lando:
 Ŝvelu la anĝela kri',
 "Jen naskiĝas Krist' al ni!"
 Vibras la anĝelsonor',
 "Al la nova reĝo glor'."

Ĉiam do al Krist' ador',
 Krist', eterne la Sinjor'!
 Jen malfrue, virgulin'
 En Betleĥem naskis lin.
 Jen por homa savmisio
 Mem enkarniĝinta Dio!
 Al homaro el ĉiel'
 Venis jam Emanuel';
 Vibras la anĝelsonor',
 "Al la nova reĝo glor'."

Vivu, Paca Princ' sur ter',
 Vivu, Suno de Esper'!
 Lumon, vivon donas li,
 Save leviĝinta Di'.
 Li rezignas pri impono,
 Por ke ne plu mortu Homo,
 Por ke releviĝu ni
 Renaskiĝe jam pro li:
 Vibras la anĝelsonor',
 "Al la nova reĝo glor'."

Tradukis J. C. Wells.

EL NIA LETERKESTO

Estimata Sinjoro — Antaŭ du monatoj mi petis al la ĉefo de la biblioteko en Blackburn, ke li bonvole akiru gramofonajn diskojn en Esperanto. Mi estas tre kontenta informi vin, ke li faris tion kaj nun mi povas aŭskulti lecionojn en la lingvo, Esperanto. Eble estus bone, se vi informus la legantojn de la "B.E.", ke estas eble pruntepreni tiajn diskojn se ili petus al la bibliotekestroj.

J. S. Gavan.

Estimata Redaktoro — Kiam mi ekvidis, ke vi konfidis al Humphrey Tonkin recenzi mian libreton Pinta Kraĵono, mi ĝojis: ĉar iom mi aŭdis pri tiu junulo, precipe de la kompatinda Sturmer, kiu entuziasme raportis, kiel verve kaj bone li deklamis el nia poezio en la Londona klubo. Sed kun ĉagreno mi legis, ke miaj versoj enuigis lin kaj ke, por trovi ian apogpunkton, li devis cerbumi komparojn kun Milton, Swift, kaj aliaj anglaj aŭtoroj. Tio estas rimedo, kiun trafe uzis la unika Sturmer (kompari Esperantan verkon kun diversaj nacilingvaj verkoj) kaj, imite kaj maltrafe, pluraj postaj recenzantoj. Al mi tia praktiko ŝajnas stranga, kvazaŭ iu recenzus anglan poemaron, komparante ĝin kun poezio ĉina, persa, kaj finna, anstataŭ kun la poezio angla kaj kun la ceteraj verkoj de la sama aŭtoro. Mi preferas, ke oni juĝu min kiel Esperantan aŭtoron, ĉar tio estas mia kadro. Se mi skribis pri la homo "*Per bestofeloj li la honton kaŝis*", influis min ne Milton, sed Kalocsay ("*Vi forĵetis vian veston haran*" ktp: vd. *Homo en Streĉita Kordo*) kaj ĉe *Korpopartoj* influis min ne Swift, sed (kiel mi mem notis) Karinthi, kiun mi konas nur laŭ la Esperanta traduko. Entute miaj notoj abunde atestas mian Esperantan fonon, kaj mi miras, ke S-ro Tonkin povis tion tute pretervidi.

Precipe mi bedaŭras, ke amiko Tonkin trovis la Jubilean Eposon teda. Raymond Schwartz citis, ke en literaturo "ĉiuj specoj estas bonaj, ĉiuj krom la . . . enuiga", kaj li aldonis, ke li "ne havis alian celon ol eviti tiun lastan". Mi mem havas similan celon, kaj mi bedaŭras el koro, ke por amiko Tonkin mi ĝin maltrafis. Interesiĝo estas ja baza postulo por ĉia recenza laboro: se la ricevita verko ne tuŝas la intereson aŭ simpation, oni prefere transdonu ĝin al iu alia. Oni devas simpatii kaj akcepti la intencon de la verkisto, kaj sur tiu bazo oni povas kritiki frukte kaj laŭplaĉe draste: sed sen tiu komuna ligo inter aŭtoro kaj recenzanto estas neeble recenzi.

Manpremas,

Reto Rossetti.

Programo de Radio Zagreb por Decembro kaj Januaro

Dec.

- la 15-an: Honore al la Zamenhofa Tago kaj la Tago de la homaj rajtoj.
- la 22-an: Honore al Frederiko Chopin.
- la 29-an: Novajoj el la Movado kaj respondoj al korespondantoj.

Jan.

- la 5-an: Humuraj novjaraj deziroj.
- la 12-an: Ni prezentas al vi la jugoslavan verkiston Ivo Andriĉ.
- la 19-an: Novajoj el teknika mondo.
- la 26-an: Respondoj al korespondantoj kaj novajoj el la Movado.

Avorto: Ĉiujare kiel fungoj aperas projektoj de internacia lingvo. Kiel fungoj ili post iom da tempo malaperas, sed ilia vivdaŭro multe dependas de la Esperantistoj, kiuj ofte provizas la plej bonan grundon por ilia kreskado. Restu sennoma do ĵus aperinta fungo de la plej venena speco. Ĝi insidas kontraŭ la Fundamento, celante interalie meti la lingvon en la prokrustan liton de la latina alfabeto, kaj cetere ĝi pretendas, ke ĝi estas la Esperanto. Tio indignigas ĉiun samideanon, sed neniu per rekta atako falu en la kaptilon, kio donos al ĉi tiu trompaĵo senpagan reklamon.

C. D. A. Capp.

La Junularo Esperantista Brita

La Internacian Kongreson de T.E.J.O. en la jaro 1958 partoprenis nur unu Anglo; ĉi-jare tridek ĉeestis la Kongreson en Rotterdam. En 1958 la nombro de britaj gejunuloj kiuj vojaĝis al Mainz por la 43a U.K. estis kvar aŭ kvin; malpli ol triono de la nombro kiuj en 1960 iris al Bruselo por la 45a.

Tiujn ege kuraĝigajn ciferojn citas Humphrey Tonkin en la anglalingva redakcia ĉefartikolo de la septembro-oktobra numero de *Kial Ne?*, artikolo kiu enhavas multon pripensindan kaj por la junularo kaj por la plenaĝularo. Li diras unue, ke estas memorinda la Kongreso de B.E.A. en 1959, kiam la Asocio "decidis partianiĝi kun la anĝeloj, aŭ vendi sian animon al la Diablo, laŭ la vidpunkto," t.e. ke ĝi fondis la junularan sekcion kiu havas nun la nomon "Junularo Esperantista Brita." Sed nura fondiĝo ne sufiĉis; sen la plimulto de la Brita Esperantistaro kiuj tiam favoris kaj poste subtenis nian Organizon, ni estus povintaj fari preskaŭ nenion ajn.

Li plue diras, ke la celo de J.E.B. ne estas precipe la provizo de novaj gvidantoj por Esperantismo; ĝi celas "konvinki ne-esperantistojn, ke la lingvo meritas ilian subtenon", kaj se inter la novaj adeptoj troviĝos kelkaj elstaraj homoj, kiuj iam prenos oficon en la Movado, tio estos nur bonŝanco, ne la kialo de nia ekzisto.

Lastmomente! Jus venis la informo ke Lord Boyd Orr, Nobel-pacpremiito kaj fama subtenanto de internaciismaj ideoj, konsentis esti Protektanto de la 17-a Kongreso de T.E.J.O., okazonta en Britujo venontjare. J.E.B. anoncos siajn detalajn planojn por la Kongreso post kelkaj semajnoj.

T. G. Page.

Nekrologo

Mi pensas pri **Prof. D-ro Giorgio Canuto** kiel gaja ĉarma kunulo, kies viveco kaj ŝercemo malpezigis la longajn horojn de diskuto kiujn ni kune pasigis de kiam en 1956 li fariĝis Prezidanto de U.E.A. Li tamen portis al tiu tasko saĝecon kaj scion, kiujn li gajnis en sia grava jur-medicina laboro por la Universitato kaj la Ŝtato en Italujo. Li estis tre eminenta kaj ĝuis la amikecon de gravuloj kun multaj diversaj interesoj, kaj tiu fakto ebligis al li levi la rangon de Esperanto kaj efike kontraŭstari la kritikojn de nesciantoj en gravaj lokoj. Kiel Prezidanto, li malavare donacis materie kaj labore al la Itala Esperanto-Federacio, kiu estas unu el la plej viglaj kaj sukcesaj landaj asocioj.

Lia forpaso, la 29an de Oktobro, 1960 je la frua aĝo de 63 jaroj lasas vere grandan vakan lokon en la movado kaj en la koroj de liaj multaj geamikoj.

La tuta brita movado sincere kondolencas kun lia familio.

H. W. Holmes.

Fianĉiĝo

Bradford-grupano **F-ino Muriel Miller** fianĉiĝis kun **S-ro Edgar Palmer** el Rochester, Kent, ano de la Sub-Orienta Federacio, la 1-an de Oktobro, 1960.

Morto

La 30-an de Oktobro 1960 mortis 87-jara **S-ro G. Cecil Jones**, membro de B.E.A. ekde 1956.

La Biblioteko

Received with thanks (to 14th Nov.): F-inoj M. Boulton, Y. Costa, S-ino F. M. White, E. W. Outon, books; F-ino V. C. Nixon, 10s. (Has any reader an unwanted copy of the Bible in Basic English, which he would be willing to give to the Library? We have the N.T. Write first.)

M. C. B.

Translation Competition 27

[Hunger.] Its abiding place was in all things fitted to it. A narrow winding street, full of offence and stench, with other narrow winding streets diverging, all peopled by rags and nightcaps, and all visible things with a brooding look upon them that looked ill. In the hunted air of the people there was yet some wild-beast thought of the possibility of turning at bay. Depressed and slinking though they were, eyes of fire were not wanting among them; nor compressed lips, white with what they suppressed; nor foreheads knitted into the likeness of the gallows-rope they mused about enduring or inflicting. The trade signs (and they were almost as many as the shops) were, all, grim illustrations of Want. The butcher and the porkman painted up only the leanest scraps of meat; the baker, the coarsest of meagre loaves. The people rude pictured as drinking in the wine-shops, croaked over their scanty measures of thin wine and beer, and were gloweringly confidential together. Nothing was represented in a flourishing condition, save tools and weapons; but, the cutler's knives and axes were sharp and bright, the smith's hammers were heavy, and the gunmaker's stock was murderous.

From *A Tale of Two Cities*

Translations should be sent in an envelope marked *Traduko* and arrive at the B.E.A. Office before 21st January next. Books to be chosen from the B.E.A. Book List to the value of 10s. 6d. will be awarded to the sender of the best translation, if sufficient entries are received. The result will be announced in our March issue.

La koverto atingu la oficejon plej malfrue dek tagojn post la finiĝo de la kvaronjaro en kiu ili eldoniĝis.

N.B.—*Neniu ajn* diru al gazeto, ke li aŭ ŝi "esperas partopreni konkurson"!

J.W.L.

THE K.R.C. STURMER TRANSLATION COMPETITION

The closing date for this competition has been deferred until Friday, 24th March, 1961, to give competitors more time and to permit entries from overseas, in accordance with the intentions of Mr. Sturmer. (See *B.E.*, October, 1960.)

Translation into English of Zamenhof's poem "Mia Penso" must be signed with a pseudonym and the real name enclosed in a separate sealed envelope. Entries must reach the Secretary, London Esperanto Club, 153, Drummond St., London, N.W.1, by the above date. A competitor may submit more than one entry.

LETERKONKURSO

La gazetoj estas grava rimedo por informado pri nia afero. Ĉu vi sufiĉe atentas tion? Por instigi al vi sendi leterojn B.E.A. proponas al vi premion por bonaj eldonitaj leteroj. Jen la kondiĉoj:

1. La skribinto estu ano de B.E.A.
2. La Redaktoro de B.E.A. rajtos represi la leteron en "B.E." kun, se necese, la konsento de la gazeto en kiu oni eldonis la leteron.
3. La premio estos unu pundo por elspezo por libroj, aŭ kotizoj, k.s., ĉe B.E.A.
4. La Prezidanto de B.E.A. juĝos la leterojn kaj atentos ilian enhavon, varbigan valoron kaj aliajn kvalitojn. Lia decido estos fina kaj neniu ajn oficisto de B.E.A. korespondos pri tio.
5. Neniu persono ricevos premion dufoje.
6. La juĝado okazos ĉiun kvaronjaron, kaj la unua estos de la 1-a de Januaro ĝis la 31-a de Marto. Se troviĝas pli ol unu bonega letero en iu kvaronjaro, la prezidanto rajtos, en konsulto kun la Administra Komitato, doni alia(j)n premio(j)n.
7. La konkursaĵoj devas konsisti el gazet-tranĉaĵo, kune kun la nomo de la gazeto, la dato de eldono kaj la plena nomo de la skribinto. En okazo de fakgazeto la konkursanto indiku ĝian gravecon por la informo de la Prezidanto.
8. La konkursaĵoj estu en koverto, sur kies eksteraĵo oni skribu "Leterkonkurso".

SMALL ANNOUNCEMENTS

2d. per word. Minimum 2s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the B.E.A. Office by the 20th of the month

Kaj kiam la anĝeloj foriris de ili en la ĉielon, la paŝtistoj diris unu al alia: Ni jam iru ĝis Bet-Lehem, kaj vidu ĉi tiun okazintaĵon, kiun la Eternulo sciigis al ni.

S-ta Luko 2. 15.

Brita Esperanto-Humanistaro. Bonvenigas ĉiujn Humanistojn en sian membraron. Filiĝinta al B.E.A. Renkontiĝas ĉiumarde ĉe Conway Hall, W.C.1, je 18.30a h. Sendu minimume 7s. 6p. kiel kotizon al Sek-Kasisto, G. L. Dickinson, 21, Gribble Road, Liverpool, 10.

The Workers' Esperanto Movement associates world friendship with trade union, co-operative and socialist principles. Details and magazine sent free: 27, Argyle Road, Ilford, Essex.

Socialist Leader, 48, Dundas Street, Glasgow, C.1. Single copies 3d. : 12 weeks 3s. : 24 weeks 8s. : 52 weeks 15s. 6d. Complete *Esperanto* article in every issue.

Croydon Young Esperantists' Club. New Year's Eve Dance. 8 p.m. to midnight, Saturday, 31st December. Adult School Hall, corner of Park Lane and Friends Road, Croydon. Admission 5s., by ticket only, from J. Jackson, 123, Sutherland Road, West Croydon. (Supported by Brighton and Bromley.)

Nigro Usona Esperanta Societo, 5006, Drexel Boulevard, Chicago 15, Illinois, U.S.A., deziras korespondi kun gesamideanoj monde pri muziko klasika kaj ĵaza, literaturo, fiziologio, folkloro kaj edukiteco; kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kaj librojn.

Learner wishes to buy second-hand Cox's Esperanto Grammar and Commentary. Cross, 16, Arcadian Avenue, Bexley, Kent.

"I.F.L." Popular holidays abroad open to all Esperantists. Brochure on request (mention "B.E.") from the Editor, *Friendship News*, 52, Wilman Road, Tunbridge Wells.

Available again. "Esperanto" pennants for bicycles, etc. Size 9 in. by 6 in., with green star. 1s. 9d. post paid from B.E.A. office.

Londona gastejo. Oni parolas Esperanton kaj francan. 19s. 6p. ĉiunokte. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Matenmanĝo inkluzive. Warrington House, 1, Warrington Crescent, London, W.9. Tel. CUNningham 4487.

Belan frontispicon havas "William Penn"; majstra prelego de Prof. D-ro E. Privat. Havebla de Kvakera Esperantista Societo, Bath Road, Ventnor, Isle of Wight. Prezo 1s. 6p.

PLEASE HAND THIS TO A FRIEND WHO IS NOT YET A MEMBER

THE British Esperanto Association consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership:—

SUBSCRIPTION : 20s. per annum. Persons joining after 1st July may pay 10s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I,

hereby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first

Subscription of

Signature

Nationality Rank, Profession or Occupation

Address

Date Age (if under 21)

Have you a friend who may be interested in Esperanto ?

THEN READ ON !

ESSENTIAL ESPERANTO

by
W.A. GETHING, O.B.E., B.Sc., F.B.E.A.

8s. 6d.

"The very name of the Author . . . is a guarantee of the worthiness of this book."—*La Praktiko (Holland)*

" . . . Whoever works through this book will say as Mr. Leslie says . . . 'Why did I not take up Esperanto before ?'"—*Germana Esperanto-Revuo*

"The essence of the book is good . . . outstandingly good!"—
Dia Regno (Holland)

" . . . On the contrary, this book is clearly the product of an experienced and capable Esperantist"—

The Worker Esperantist

"This book will enable any person with or without a knowledge of grammar, correctly to speak and write Esperanto . . ."—*The British Esperantist*

" . . . This book is unstintingly recommended"—*Kanada Esperanto-Revuo*

**This book will make a fine Christmas Gift.
Why not write to the Association, or to
W. Foulsham & Co. Ltd., 2-5 Old Bond Street
London, W.1**



45 - a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bruselo — Belgujo
30-VII — 6-VIII 1960

ADRESO : 45-a Universala Kongreso
de Esperanto-Bruselo

BANKO : „Banko de Bruselo“ en Bruselo

TELEGRAFO : Esperanto Bruselo

PAGO: Mi sendas la pagon kaj la
aliĝilon al:

per

La monon disponigu por jenaj kontoj:

Kotizo b.fr.

Literatura Kaso >

Blindula Kaso >

Adopta Kaso >

Entute b.fr.

ALIĜILO

Bonvolu nepre skribi preslitere

Mi aliĝas al la 45-a Universala Kongreso de Esperanto kaj samtempe mi sendas pagon kaj aliĝilon laŭ la supra informo.

Familia nomo S-ro, S-ino, F-ino (forstreku du)

Antaŭnomo

Strato kaj numero

Urbo

Provinco (kie necesas por la poŝto)

Lando

Profesio (nur por statistiko)

Antaŭnomo de edz(in)o/infano, kiu aliĝas samtempe (laŭ aldonita aparta aliĝilo)

Naskiĝjaro (nur por statistiko)

Dato de tiu ĉi aliĝilo

Subskribo

Rajtas aliĝi al la Kongreso nur esperantistoj, nome personoj, kiuj konas kaj uzas Esperanton.

La Loka Kongresa Komitato ne akceptos aliĝilojn post la 30-a de junio 1960.

NOTO: La naskiĝjaro estas petata nur por statistike kalkuli la mezan aĝon de la Kongresanaro. Ĉiu informo restos konfidenca.

KONGRES - KOTIZOJ	Ĝis	Ĝis	Ĝis
	31.XII.1959	31.III.1960	30.VI.1960
	b.fr.	b.fr.	b.fr.
Kongresano	450	525	600
Edz(in)o de kongresano	225	265	300
Junul(in)o ne pli ol 20-jara kaj studentoj	150	185	225

RABATOJ: Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas individuaj membroj de U.E.A. (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 50 b.fr. Edzino de membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familianoj. La rabato ne validas por gejunuloj, studentoj kaj kiu ajn alia kategorio de kongresanoj.

STUDENTOJ: La speciala tarifo por studentoj validas nur, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de lia/ŝia fakultato.

BLINDULOJ: Blindulo kaj gvidanto ricevas senpagan kongreskarton ĝis fino de marto, se kun la aliĝilo troviĝas atesto de okulkuracisto aŭ blindul-organizaĵo. Post la fino de marto oni pagas la duonon de la tiuperioda kotizo.

INSTRUKCIOJ por aliĝi al la 45-a Universala Kongreso:

1. Ĉiu partoprenonto nepre plenigu apartan aliĝilon. Se oni ne havas aliĝilon, uzu samformatan paperon.
2. Donu ĉiujn petitajn detalojn. Skribu klare.
3. Pagu al via landa peranto, al kiu vi sendu la aliĝilon, aŭ al la kongresa banko aŭ per pagiloj ŝanĝeblaj en banko.
4. Aliĝilo sen pago ne valoras kaj ne estos traktata.
5. La kongreskotizo ne estas repagebla, eĉ se la kongresano ne venas.
6. Kongresan karton oni ne rajtas doni, vendi aŭ intersanĝi.
7. Se aliĝinto sendas pli ol la kotizon, la ekstraĵo estas notita en lia kredito.
8. Pagante por alia persono, sciigu per la aliĝilo la celon de la pago.